



PILO-PRESS

20,- GM

Internacia Inform servo

P&amp;K Nürnberg

N-ro 5/1973 29 jan 73  
Aperas ĉiusemajne

819 56 -851

Eldonanto/Herausgeber:

Ludwig Pickel

Postfach 2113

D-85 Nürnberg 2

Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Paco por Vjetnamio

Nurnbergo (PP) Marde, 23 jan 73, en Parizo estis parafita interkonsento pri armistiko en Vjetnamio inter Kissinger kaj Le Duc Tho (vidu la bildon!). La interkonsento estis subskribita en Parizo sabate, la 27 jan 73, kaj ekvalidas ekde la sama tago. \*gi

Per tio finiĝis pli ol 30jara milito en Hindo-Ĉinio, kiu speciale dum la pasintaj jaroj ankaŭ okupis Esperantistajn mediojn. Speciale en la Esperanto-elsendoj de Radio Varsovio kaj Pekino\*trovis fortan reeĥon per polemikaj kaj akraj komentarioj kaj protestoj kontraŭ la Usona interveno. Tamen oni devas diri, ke speciale dum la pasinta duona jaro la komentarioj kaj atakoj disaŭdigis singardan optimismon kaj esperon pri baldaŭa finiĝo de la milito.

Sed kio por ni esperantistoj estas interesa, estas la fakto, ke malgraŭ tiu terura milito ne ĉesis Esperanto-agado en ambaŭ partoj de Vjetnamio kaj ni deziras kaj esperas, ke post la milito Esperanto pli kaj pli disvastiĝos en Vjetnamio.

Ni gratulas kaj salutis la esperantistojn en Vjetnamio. Estu la milito fino la komenco al vera paco!

\*\*\*\*\*

Vicministro akceptis esperantistojn

Romo (RARO) La 8-an de januaro 1973, delegacio de esperantistoj estis akceptita de deputito Salvatore Cottoni, itala vicministro pri transportoj kaj civila aviado. Konekse kun la aparta kompetenteco de la vicministro, partoprenis la esperantistan delegacion, interalie, doktoro Manlio Galli, Prezidanto de la Itala Federacio de la Esperantistaj Fervojoj kaj ĉefinspektoro ĉe la Italaj Ŝtatfervojoj, doktoro Alberto Menabene, Prezidanto de la Roma Esperanto-Grupo kaj kemiisto ĉe la italaj Ŝtatfervojoj, doktoro Antonio De Salvo, redaktoro de Radio Roma kaj nuntempe inspektoro ĉe Ministerio pri Transportoj kaj Civila Aviado, kaj fraŭlino Mirella Merlani, parolistino ĉe Radio Roma kaj oficistino ĉe italaj Ŝtatfervojoj. (Detaloj aliloke!)

Gojigaj informoj el Rumanio

Bukuresto (Ca) En la rumana semajngazeto "Contempul" denove aperis informo pri Esperanto, nome pri la UK ĉi-jara en Beogrado. Samtempe ni eksciis, ke nun komisiono ellaboras statutojn por Rumana Esperanto-Asocio. Oni povas esperi, ke baldaŭ do ekfunkcios oficiala Esperantomovado en Rumanio. La ŝanĝon de la registara sinteno rilate al Esperanto speciale kaŭzis la partopreno de ŝtataj rumanaĵ pupteatraj ensembloj en la ĉiujara Pupteatra Festivalo en Zagrebo.



### Ce turnopunkto?

La diskuto pri la perspektivoj de Esperanto daŭras. Unuflanke agadoj en unuopaj landoj, Italio, Jugoslavio kaj Britio klopodas atingi por Esperanto oficialan agnoskon, aliflanke agadoj sur praktikaj kampoj ne trovas la necesan subtenon de unuopaj esperantistoj kaj de Esperanto-organizaĵoj aŭ pro aliaj kaŭzoj malsukcesas. Unuflanke en certaj regionoj kaj landoj oni per modernaj kaj celkonsciaj metodoj klopodas antaŭenigi la Esperanto-instruadon, por multaj esperantistoj aliflanke Esperanto nur estas hobbio kaj neas ian "Esperanto-kulturon". Eĉ por nia plej granda Esperanto-poeto Valocsay Esperanto nur estas hobbio, kiel oni povas legi en "The British Esperantist", januaro 1973: "En lastatempa intervjuo, kiun oni povas legi en Norda Prismo n-ro 3/1972, la poeto Kalocsay asertas, ke por li Esperanto estis ĉiam nur hobbio (nu, li nomas ĝin hobbio "nobla", klinante la kapon en direkto de la idealismo), kaj plue esprimas la opinion, ke Esperanta Kulturo estas "ĉefe la amata ĉevaleta de Auld". Kion diri? Se Esperanto estas nur hobbio, kiom ajn nobla, ni ne plu miru, ke aŭtoritataj personoj ne traktas ĝin serioze. Ĉu vi povas imagi, ke la Eduka Ministerio enkondukos la filatelon kiel devigan studobjekton en ĉiuj lernejoj?"

Tiom la brita citaĵo de William Auld. Kompreneble Esperanto povas esti hobbio, same kiel la aliaj lingvoj. Sed ni devas krei kadrojn, kie Esperanto ne plu estas hobbio. Ekzistas jam kelkaj ekzemploj, la radio-elsendoj en Esperanto, la interŝanĝo de informoj, speciale inter ĵurnalistoj, la apliko de Esperanto en kelkaj komercaj kaj turismaj entreprenoj ktp. La esperantistoj devas subteni tiujn klopodojn. Ankaŭ sur la kampo de la sportoj kelkaj esperantistoj klopodis, ĝis nun ĝi nur estis provo de kelkaj unuopuloj kaj la amaso de la esperantistoj kaj de la E-organizaĵoj inkluzive de UEA ne reagis.

Argumentoj, eĉ la plej bonaj ne konvinkas, nur la praktika vivo decidus. Ni do pli multe eniru la praktikan vivon. Kaj ni ne timu, regule sendi al instancoj kaj institucioj niajn Esperanto-periodaĵojn kaj aliajn eldonaĵojn, ĉar en ili Esperanto vivas. Ludwig Pickel

\*\*\*\*\*

### Nikolao Kopernik vidata de infanoj

Houdain (LGx) La Nordfranca Esperanto-Federacio kaj aliaj organizaĵoj invitas ĉiujn infanojn en la mondo partopreni la solenadon de la 500a naskiĝdatreveno de Nikolao Kopernik per verkado de desegnaĵoj, pentraĵoj, surgluaĵoj aŭ aliaj kreitaĵoj, inspirigantaj per la vivo, la verko kaj la naskiĝlando de la pola astronomo. 500 el la ricevitaj laboraĵoj estos montrataj okaze de multnombraj ekspozicioj pri la astronomo en Francio, Pollando kaj eventuale en aliaj landoj. Por la alsendo de la laboraĵoj validas du limdatoj: 1) ĝis la 1a de marto 1973 kaj 2) la 1a de julio 1973.

Oni sendu ilin al: S-ro I. Flaczynski, Esperanto-Klubo Amicale Laique/Ecole Elby, Rue Mitry, F-62150 Houdain, Francio, kie oni povas ricevi detalajn informojn.

I O E malfondiĝis

Beogrado (PP) I O E, la Internacia Instituto por Oficialigo de Esperanto, ekde la 31 dec 72 ĉesis ekzisti. Santerpe ĉesas aperi ties organo, Esperanto-Gazeto. En la lasta numero, decembro 1972, oni povas legi ampleksajn artikolojn pri la kaŭzoj de la ĉesigo. IOE laboris dum 7 jaroj kaj aperis entute 65 numeroj de Esperanto-Gazeto.

Ne eblas per mallongaj vortoj klarigi la kaŭzojn, kiuj devigis la respondecajn gvidantojn ĉesigi la laboron. Ĉiu intereso mem legu la koncernajn artikolojn, speciale "Pensoj je Butikfermo" kaj "Senespera Meditado pri nia sorto".

Tamen necesas akcenti, ke estas bedaŭrinda la malapero de IOE, kiu klopodis agadi sur praktikaj kampoj.

Eŭropa Feriosemajno en Svislando

Al 14-a Eŭropa Feriosemajno en Svislando kore invitas Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj. Ĝi okazos de la 2-a ĝis la 8-a de septembro 1973 sur Fürigen ĉe la Kvarkantona Lago (Vierwaldstättersee) kaj ampleksas gvidatajn ekskursojn variajn, antaŭtagmezajn Esperanto-lecionojn diversgradejn, vesperajn arangojn distrajn. Geesperantistoj de ĉiu aĝo kaj profesio estas bonvenaj. Anoncojn kaj informpetojn oni adresu al S-ro Ernst Glättli, SAEF-sekretario, Laurstrasse 17, CH-5200 Brugg, Svislando.

Indiko Kiel aspektas oficiala dokumento de EEK de Bruselo oni povas vidi sur paĝo 4. Malgraŭ la dokumento uzas 6 lingvojn, oni diskriminacias unu lingvon, nome la keltan lingvon de Irlando. La Eŭropa Esperanto-Kongreso en Luksemburgo estos bona okazo por atentigi pri la lingva problemo en EEK

La Semajno en la Radio

Berno ĉi-foje surprizis nin per intervjuo. S-ro Gacond intervjuis noktrede s-ron Reinhard Haupenthal pri la stato de la nov-eldonota Enciklopedio de Esperanto okaze de lia vizito en la Centro por Internacia Lingvo La Chafond. La intervjuito esprimis la esperon, ke la verko aperos ankoraŭ dum ĉi tiu jardeko. - Lunde d-ro A. Baur prelegis pri Appenzell kaj -anoj. Zagrebo ĉi-foje respondis al korespondantoj de aŭskultantoj kaj menciis ricevitaĵajn periodaĵojn, inter ili ankaŭ Pilo-Press kun la rimarko, ke ĝi estas la sola E-periodaĵo kun regula recenzo pri E-elsendoj. ROMO pri la E-kuriero (vidu la titolpaĝon!) ni raportos pli detale en venonta eldono de PP.- Varsovio La ĉi-foja E-ekspreso elradiis ĉi-foje du PP-informojn kaj atentigis pri la invito al infandeseĝnaja ekspozicio en Francio okaze de la Kopernik-jaro (vidu p. 2). Du germanaj aŭskultantoj raportis en la kadro de la rubriko "Niaj aŭskultantoj sciigas" kaj A. Pettyn intervjuis Detlev Blanke de CLE, Berlino GDR, resp. Béla Bercei, Budapeŝto. La armistico en Vjetnamio estis la ĉefa tono en la ĉi-semajnaj politikaj komentoj kaj informoj. La mondo ekspiris... oni konstatis. En la ĉi-lunda komentario pri la polaj-ĉeĥaj interparoloj oni menciis la polan deklaron, ke necesas la normaligo de la rilatoj inter Ĉeĥoslovakio kaj FRG. Sed sur etera tagordo restas ankaŭ la konflikto en la Proksima Oriento. Estus desirinde, ke post Vjetnamio ankaŭ por tiu konflikto estus trovobla formulo por ĝia solvo, justa por ambaŭ flankoj.



Tiel nun  
aspektas  
EEK-dokur  
mento!  
Pro deman-  
doj turnu  
vin al Dr.  
Bormann  
D205 Ham-  
burg 80  
Schärstr.  
26

Det bekræftes, at foranstående tekst er i overensstemmelse med det eksemplar af slutakten, der er underskrevet i Bruxelles den 22. juli 1972 i anledning af undertegnelsen af Overenskomsten mellem medlemsstaterne i Det europæiske Kul- og Stålfællesskab og republikken Østrig og deponeret i arkiverne i Sekretariatet for Rådet for De europæiske Fællesskaber.

Vorstehender Wortlaut ist die beglaubigte Abschrift des Exemplars der Schlussakte, die am 22. Juli 1972 anlässlich der Unterzeichnung des Abkommens zwischen den Mitgliedstaaten der Europäischen Gemeinschaft für Kohle und Stahl und der Republik Oesterreich in Brüssel unterzeichnet und im Archiv des Sekretariats des Rates der Europäischen Gemeinschaften hinterlegt worden ist.

The preceding text is hereby certified as a true copy of the Final Act, signed at Brussels on 22 July 1972 on the occasion of the signature of the Agreement between the Member States of the European Coal and Steel Community and the Republic of Austria and deposited in the archives of the Secretariat of the Council of the European Communities.


Le texte qui précède est certifié conforme à l'exemplaire de l'acte final, signé à Bruxelles le 22 juillet 1972, à l'occasion de la signature de l'Accord entre les Etats membres de la Communauté européenne du charbon et de l'acier et la République d'Autriche et déposé dans les archives du Secrétariat du Conseil des Communautés européennes.

La presente è copia certificata conforme dell'esemplare dell'Atto finale, firmato a Bruxelles il 22 luglio 1972, in occasione della firma dell'Accordo tra gli Stati membri della Comunità Europea del Carbono e dell'Acciaio e la Repubblica d'Austria e depositato negli archivi del Segretariato del Consiglio delle Comunità Europee.

Hierdoor wordt vastgesteld dat voorgaande tekst eensluidend is met het exemplaar van de Slotakte, ondertekend te Brussel op 22 juli 1972 ter gelegenheid van de ondertekening van de Overeenkomst tussen de Lid-Staten van de Europese Gemeenschap voor Kolen en Staal en de Republiek Oostenrijk en neergelegd in het archief van het Secretariaat van de Raad der Europese Gemeenschappen.

Bruxelles, den	20. november 1972
Brüssel, den	20. November 1972
Brussels,	20 November 1972
Bruxelles, le	20 novembre 1972
Bruxelles, addi'	20 novembre 1972
Brüssel,	20 november 1972

Generalsekretären  
for Rådet for De europæiske Fællesskaber  
Der Generalsekretär  
des Rates der Europäischen Gemeinschaften  
The Secretary-General  
of the Council of the European Communities  
Le Secrétaire Général  
du Conseil des Communautés européennes  
Il Segretario Generale  
del Consiglio delle Comunità Europee  
De Secretaris-Generaal  
van de Raad der Europese Gemeenschappen

  
C a l m e s